



Januaro, Februaro, Marto 1956, Nroj 5, 6, 7.

LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO”

Redaktejo: S-ino E. Burgler, Amsterdam-W., Overtoom 435²

Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55

Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Abonprezo 3.50 ned. guld. aŭ egalvaloro

Nia TEJO (Tutmonda Esperanto Junular-Organizo) skisemajno 1955/56 sur Radstädter Tauern en Aŭstrio:

Malgraŭ bona preparo kaj malgraŭ multaj aliĝoj el kvin landoj la TEJO-skisemajno staris sub maloportuna antaŭsigno: Mankis la neĝo - tiel almenaŭ ŝajnis - ĉar en Salzburg estis tute nenia neĝo, ja eĉ ŝajnis jam printempoj iomete. Same estis preskaŭ en tuta Eŭropo. Do nur 13 el la preskaŭ 40 aliĝintoj alvenis. En Radstädter Tauern tamen oni ne malhavis neĝon! Jam unuamomente ĉiu raviĝis pro nia vintra paradizo. Ni formis internacian rondeton, el tri landoj: Nederlando, Germanujo, Aŭstrujo.

Forlasinte la aŭtobuson jam komenciĝis Esperantujo: De la strato ni iris laŭ la „Esperanto-Vojo” al Fellersalm, nia skihejmo. Ni estis tro malmultaj por okupi la tutan domon, do ni devis dividi la domon kun junulara grupo el Wien. Jam ek de la unua tago ni bonege harmoniis. Ili ludis kaj kantis kun ni ĉiuvespere en Esperanto kaj germane. Ofte ni interkonsentis kanti la unuan strofon germane, la aliajn esperante. Tiamaniere ankaŭ neesperantistoj kantis en nia internacia lingvo.

Ni ankaŭ ne forgesis la laboron: Kelkvespere ni partiĝis en tri grupojn

por po-memstare ellabori jenajn temojn por la tuj sekvanta diskuto:

„Kian valoron kaj kiajn uzeblecojn ofertas Esperanto al la junulo? Kial la junulo lernu Esperanton?”

„Kia estas la hodiaŭa stato de Esperanto?”

„Ĉu „Unuiginta Eŭropo” estas celinda? Se jes: Kiajn avantaĝojn ĝi ofertas? - Kian rolon havas Esperanto en ĝi?”

„Kiajn eblecojn havas la junulo, konstrue kunhelpi ĉe la ĝenerala plibonigo en sia ŝtato? - Ĉu Esperanto estas enkadrigibla en tia ŝtata plukonstruo? Kial?”

La ŝtata provincestro de Salzburg, d-ro Josef Klaus, al kiu ni sendis bondezirbileton okaze de la jarŝanĝiĝo, sendis al ni tre afablan respondon, en kiu li skribis interalie:

„Al Vi kaj Viaj amikoj de la Tutmonda Esperanto Junular-Organizo mi kore dankas pro la salutoj kaj bondeziroj Bedaŭrinde ne eblis al mi, viziti Vin Mi deziras al Vi bonan sukceson de la kurso kaj feliĉan jaron 1956. Plej kore Via Klaus.”

Tuj post la matenmanĝo ni ĉiutage ekiris por pruvi niajn pli-malpli gran-

ORGANIZAJ INFORMOJ:

La redakto petas ĉiujn, kiuj gajnis en L'Aquila senpagan abonadon por LJV tion nepre tuj sciigi, ĉar perdiĝis la listo kun la nomo de la premiitoj. Bv. ankaŭ indiki ĉu vi estis premiata per 3 monata, aŭ per ½ jara abono.

Francaj TEJO-membroj, kiuj ĝis nun ne pagis la kotizon por 1955/56, tuj sendu ĝin al Mme L. Giloteaux-Topor von Waldowski, 8ter/25 Rue de Soubise, ROUBAIX (Nord). C.C.P. Lille 1061-46:

350 fr.frankoj por aktivaj kaj subten. membroj,
225 fr.frankoj por membroj malpli ol 14 jaraĵ.

Germanujo: TEJO-membroj, kiuj ankoraŭ ne pagis sian kotizon pagu ĝin tuj al Sro Hubert Krüger, Eisenbahnstrasse 29/X 1, Berlin S.O. 36.

Por la Estraro de TEJO estas multe pli malagraba sento, ol por vi, ke la revuo ne povas ĝustatempe kaj en bela formo aperi. Ni havas antaŭpresitajn kapojn krom tiu ĉiu ankoraŭ por ± 2 numeroj. Konsiderante, ke ĝuste la presigo de la titolpaĝo kaŭzas al ni gravajn zorgojn, nun vi ricevas tri numerojn samtempe. Aprila-maja numero aperos post 3 semajnoj. La perantoj sendu monon, kiun ili kolektis al la adreso de la redaktoro.

De la 30a de marto ĝis la 2a de aprilo la GERMANA ESPERANTO JUNULARO aranĝos 3an Interzonan renkontiĝon. Prezo, inkluzive manĝaĵojn, loĝadon kaj diversajn aranĝojn estas 13.- g.m. Kiu ne povas partopreni, sendu saluletieron al Sro H. Krüger, Eisenbahnstr. 29/X-1, Berlin S.O. 36.

Ne hezitu, agu tuj.

dajn kapablojn sur la lignoj. Kompreneble ni partiĝis en du grupojn: la „bonaj” kaj la „komencantoj”. Dum la „bonaj” faris ekskursojn sur la ravogajn montopintojn, la komencantoj ĉiam restis en la najbareco de la domo kaj ĉe la liftoj; nur la lastajn tagojn ankaŭ ili povis ekskursi. Ili ja estis sisteme lernintaj dum la posttagmezo de la pli bonaj skiantoj.

La Malnovan Jaron ni adiaŭis kantante kaj ludante ĝis la deka. De tiam ni dancis laŭ la muziko de radio-aparato ĝis la dua matene. Sed kiam la adiaŭanta jaro batalis kun la ĵus alvenanta, ankaŭ ni grupiĝis en du partiojn kaj kontraŭbatalis nin en humore-furioza neĝpilkbatalo, akompanate de la laŭteĝaj batalekrioj. La luno arĝente radiis super ni kaj misterigis la pejzaĝon.

Ni multe skiis, multe amuziĝis kaj en la neĝkampoj kaj ĉirkaŭ la forno. La manĝo estis riĉa kaj ankaŭ la vetero estis kontentiga, kvankam ĝi ne estis tre bela.

Resume: Estis belega semajno por ĉiu partopreninto! Dum ni premis niajn manojn en la adiaŭa horo ni ne forĝesis diri:

Ĝis revido venontvintre!

Ankaŭ Vi, kara leganto, notu jam nun: Venontvintre TEJO denove aranĝos skisemajnojn de la 26-a de Decembro ĝis la 7-a de Januaro kaj en la semajno post la paskodimanĉo 1957. Laŭdezire ni aranĝas tian semajnon ankaŭ por plenkreskuloj (amikoj de TEJO).

Ĝis revido, geamikoj! Ĉu jam dumsomere en BŬSUM?

Reiter Heinrich,
prezidanto de TEJO.

12a INTERNACIA JUNULARKUNVENO DE TEJO,

en Büsum de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1956a.

Kvankam ni bone scias, ke la esperantistoj ne nur pro la ĉarmeco de la kongresurbo vizitas la kongresojn, la nuna gast-urbo Büsum certe ne senluziigos la partoprenantojn. Büsum situas en la proksimeco de Hamburgo, ĝi estas rava banloko. Do la esperantistoj „resaniĝos” ne nur anime (ĉar ja ni ĉiuj estos feliĉaj sciante, ke la TEJO-aferoj bone marŝas), sed ankaŭ korpe.

La ĉijara kunveno cetere superos ĉiujn antaŭajn kunvenojn de TEJO,

Por TEJO-anoj:

	antaŭ 1/5/56	antaŭ 1/7/56
1. ĝis 18 j.	36.- gm.	41.- gm.
2. ĝis 30 j.	39.- gm.	44.- gm.
3. pli ol 30 j.	45.- gm.	50.- gm.

4. Ne TEJO-anoj pagos 5.- gm. pli.
5. Partoprenontoj de la ŝipekskurso al la rokinsulo Helgoland pagos 10.- gm. pli.

La kotizo No. 3 estas nur por karavanestroj, amikoj de junularo, specialaj invititoj kaj geinstruistoj.

Ne forgesu aldoni al la aliĝilo internacian respondkuponon.

**AFRANKU NEPRE FILATELE
POR LA EKSPozICIO!**

Bonvolu atenti: Anoncu vin ĝusta-

ĉar dum la laborkunsidoj ni diskutos pri la estonta vojo de la Esperanto Junularo. Ni komune devos trovi la necesan firman bazon, kiu garantiu sukcesplenan laboron. Esperantistaj gejunuloj, studentoj, amikoj de junularo kaj eĉ izoluloj konsciu, ke ĉie ĉeesto estas nepre necesa.

O.K.K. krome zorgas pri tre interesa programo. La kostoj estas relative tiom malaltaj, ke pro tio vi certe ne devas resti hejme. Jen la kostoj:

tempe por havi garantion de akcepto. La aliĝo validas nur, kiam LKK ricebos vian antaŭpagon, (fiksita je 20.- gm.) per ĝiro al la kasistino:

Srino Heinke Sommer, Büsum, Poŝtĉekkonto: Hamburgo No 19 93 44.

Anoncu vin tuj. Ne nur TEJO bezonas vin, sed ankaŭ vi bezonas fortan, sanan, por la junularo laborantan TEJO-n.

Informojn donas: Sro Claus Ohlen, prezidanto de OKK, Hamburgo 1, Rosensallee 9 III.

TEJO-anoj en 1955.

Anglujo kaj Irlando 37; Aŭstrujo 14; Belgujo 11; Bulgarujo 2; Ĉeĥoslovakujo 13; Danujo 22; Finnlando 9; Francujo 133; Germanujo 93; Hispanujo 14; Italujo 19; Hungarujo 1; Jugoslavujo 12; Norvegujo 4; Polujo 4; Svedujo 19; Svislando 7; Afriko 6; Aŭstralio 1; Nord-Ameriko 10; Japanujo 4; Ĉinujo 1; Israelo 1; Nov-Zelando 4; Nederlando 162; entute 614

RESUMO DE PROBLEMOJ DE INVALIDOJ EN ĈEĤOSLOVAKUJO.

Ŝanĝigemeco de homaj sortoj kaj varianteco de homaj estaĵoj estas kaŭzo, ke ne estas eble egalmaniere labori al ĉiuj. Akcidentoj, malsanoj kaj lezoj estas risko de la homa vivo. Do, homo devas fariĝi objekto de senescepta kaj ĉiufanka zorgo, kio celas ankaŭ la plej eblan malpliigon de vivrisko per antaŭevitado al malsanoj kaj lezoj. Sekvoj de malfeliĉaj okazoj, kiuj ne estas eviteblaj, estas mildigitaj per asekuro. Sed, nenia asekuro plene kompensas socialan eĉ finanĉan perdon, kaŭzitan per akcidento. Do, estas necese, ĉiam serĉi kaj valorigi novajn specojn de la zorgo pri homoj laborantaj, eĉ pri homoj, kiuj jam ne povas laborenspezi sekve akcidenton. La devizo estas: Malsano ne estu kaŭzo de profito, sed ankaŭ ne estu kaŭzo de malprofito kaj perdo de la akirita vivnivelo.

Kuracado de malsanuloj intencas plej unue resanigon de la trafituloj, malpli gravas, kiajn elspezojn la kuracado postulas. Ĉe la kuracado estas bezona aktiveco de la malsanulo, tio estas: lia memdisciplino kaj favora anima stato (kredo al la resanigo, fido al la kuracisto, favoraj cirkonstancoj socialaj). Ĉiuj ĉi tiuj premisoj estas la plej kreeblaj en saniga instituto per kunlaboro de direktado de la instituto kaj memadministrato de pacientoj.

Jam dum la resanigado estas necese pensi pri estonta profesio de la trafitulo. Ankaŭ tiuj, al kiuj akcidento kaŭzis partan perdon aŭ ŝanĝon de laborkapableco, havas rajton je laboro. Per kunlaboro de sanitaraj kaj uzinaj faktoroj en entreprenoj estas necese aranĝi labor- kaj enspezkondiĉojn tiamaniere, por ke ili al do-

maĝo, kio reprezentas solan perdon de la sano, ne estu domaĝitaj du fojojn per perdo de ilia vivnivelo.

Okupado de homoj kun malpliigita aŭ ŝanĝita laborkapableco ne estas sole afero ekonomia, sed ankaŭ afero sociala kaj morala. Per ebligado de laboro al homoj sane difektitaj oni akiras laboran potencon, kiu ĝis nun restas neeluzita. Per laborenspezo estos plibonigita vivnivelo de invalidoj sen plialtigo de elspezoj de fisko por rentoj. Embarasoj, kiuj estas kaŭzigitaj sekve reduktadon de rento okaze renkontiĝo kun laborenspezo, estas forigitaj laŭ supera devizo, ke ne estus konvene, ke oni profitu je malsano, sed ankaŭ ne estu malpliigita la vivnivelo, atingita antaŭ ekmalmano per laborenspezo.

Ĉiam ankoraŭ ne estas bone komprenita la fakto, ke laboro por sane difektitaj homoj havas signifon tute eksterordinaran, ĉar ĝi liberigas invalidojn de impresado de malplivaloreco.

Invalidoj havas intereson, por ke ilia nombro ne estu altigata pli ol estas neevitebla. Ili postulas, ke estu kreitaj tiamanieraj laborokondiĉoj, por ke sanstato de laboruloj ne estu endanĝerigata.

Nuligado de rento devas esti dependa de asignado kaj sekurigado de tia laboro, kian sane difektita homo sen plua perdo de la sano povas plenumi, kaj per kio li enspezos minimume tiom, kiom li enspezis antaŭ la ekmal-saniĝo. Plej konvene estus, se ne nur ĉe ĉesado, sed ankaŭ ĉe ekstado de nekapableco al laboro rento sinsekve kompensus tiun sumon, pri kiu malplialtiĝas la salaĵo sekve malpliigitan laborkapablecon. Estas juste, sekurigi al invalidoj, kiuj ree komen-

cis labori kaj kies rento sekve labor-
enspezon estas nuligata, minimume
la saman renton, kiom ili ricevadis,
por la kazo, ke ili denove invalidiĝas.

Ĉe elekto de okupo por invalidoj es-
tas necese konsideri la fakton, pri kia
sandifekto temas. Ne gravas, se la di-
fekto devenas en laboro, milito k.sim.
Laboreblecon oni trovos plej celtra-
fe per ellasado de tiu agado, kiu el-
postulas plenan eluzadon de la difek-
tita organo. Oni devas aranĝi tiajn
limtempajn kaj lokajn laborokondiĉojn,
por ke la sanstato de invalido ne estu
plue endanĝerigata. Plej taŭga por
plimulto de invalidoj estas hejma oku-
pado, ĝia signifo por ekspluatado de
residua laborkapableco de invalidoj
ne estas sufiĉe komprenita, kaj estas
dezirinda revizio de la opinio pri ĝi.
En entreprenoj, reedukitaj invalidoj
devas esti ŝirmataj antaŭ translokiga-
do de la laboro, al kiu ili al kutimiĝis.
Estus juste, se la malprofito, kion sa-
ne difektitaj homoj suferas, estus re-

komponcita por diversaj avantaĝoj,
ekz. per prefera rajto je sidloko en
troplenigita vagonaro, per rabato je
veturpago en vagonaro, aŭtobuso kaj
sim., je enirpago en teatrejoj, kinejoj
k.sim.

Solvado de problemoj de invalidoj
estus pli facila, se oni starigus insti-
tutojn, en kiuj invalidoj trovus labo-
ron eĉ hejmon kun plena vivtena pri-
zorgo.

Resume menciitajn problemojn de
invalidoj ĉeĥoslovakaj sekvas sisteme
la Asocio de invalidoj ĉeĥoslovakaj.
Ĝi ŝatas konatigi spertojn kaj klopod-
ojn de invalidoj eksterlandaj, kaj vo-
lonte interŝanĝos informojn kaj opi-
niojn pri ĉi tiuj problemoj. Estas eble
skribi nacilingve al: SVAZ ĈESKO-
SLOVENSKYCH INVALIDU, Škol-
ská 3, Praha II.-Ĉeĥoslovakio, aŭ es-
perante al vicprezidanto de la AIC
Josef AMBROZ, Špačkova 3, Brno-
Zidenice, Osl.

Neyharting-a D-ro Zamenhof Esperanto-Fondaĵo.

La kuratoraro de la nomita fondaĵo
provis per la internaciaj Esperanto-
organizoj diskonigi la kondiĉojn por
la atingo de stipendio en la marĉa
banejo Neydharting. Sed tio ne kont-
entige sukcesis, kaj la informo pri
tio internaciskale estis nesufiĉa. En-
tute estis kvin stipendioj je dis-
pono. Unuafoje en marto 1955. Tri
stipendioj estas rezervataj por eks-
terlandaj kaj du por aŭstriaĵ Espe-
rantistoj. Kiel jam sciigite, post ple-
numo de certaj kondiĉoj povas ĉiujare
kvin esperantistoj pere de siaj kom-
petentaj organizoj peti stipendion de
la D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo
en la marĉa banejo Neydharting
(Aŭstrio) kaj tie pasigi 14 tagan ku-
racrestadon tute senkoste. La marĉa
banejo estas bonefike uzata por jenaj

terapioj: reŭmatismo, koks doloro, ar-
trito, nervaj doloroj, vejna inflamo,
hepato-, lumbo-, reno- kaj virinaj su-
feroj k.s.

La banejo situas tute sola ĉirkaŭita
de herbejoj kaj arbaroj. Kun la vila-
ĝoj kaj urbo Wels la banejo estas in-
terligita per aŭtobusa linio. Pro la
granda frekvento de la banejo la
kuracrestado de la stipendiuloj povas
okazi nur en la dua duono de marto.
El la eksterlando ĝis nun interesiĝis
pri stipendio angla, germana kaj ho-
landa esperantistoj.

Pli detalajn informojn donas nur
kontraŭ reafanko (respondkuponon)
la Kuratoraro de la Neydharting-a
D-ro Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo:
Geistingergasse 1/6/16, Vieno, Aŭs-
trio.

KULTURA SERVO.

Karaj Geamikoj,

Kvankam dum certa tempo mi ne havis rektan kontakton kun T.E.J.O., mi estis petata prizorgi ĉi tiun rubrikon - kaj akceptis tion fari, pro manko de alia zorgemulo.

Tio ne estas tute simpla afero, se oni konsideras, ke multaj membroj apenaŭ scipovas esprimi sin per elementaj frazoj. Ofte ili partoprenas la Internacian Junular-Kunvenon sub gvidado de spertulo, sed inter si plej diligente uzas la nacian lingvon.

Kaj, ĉar tiuj novuloj restadas en sia grupo, ili ne povas lertiĝi per kontakto kun alilandanoj.

Bedaŭrinde la pli lertaj gejunuloj ne sufiĉe priatentas ilin, sed ĝenerale formas mem grupon, kiu ĉeestas la distrajn aranĝojn, sed ofte forestas dum la oficialaj kunvenoj, des pli dum la laborkunsidoj.

Restas alia speco de T.E.J.O. anoj, en tre malgranda kvanto cetere: la laboremuloj, kiuj ĵus reorganizigis.

Je ili mi fidas, ĉar mi ĉeestis la laborkunsidojn en l'Aquila kaj konstatis ilian bonvolemon. Inter ili estas bonegaj esperantistoj kaj energiaj labor-

emuloj. La estonto de T.E.J.O. estas en bonaj manoj.

Sed Se la gvidantoj staras antaŭ neniel kapablaj aŭ ne konsciaj membroj, ili ne sukcesos plivalorigi la aferon. Tio signifas, ke de vi ĉiuj, aŭ pli ĝuste de Vi aparte, Kara legant(in)o dependas la sorto de Via Asocio.

Pripensu honeste momenton antaŭ ol respondi je ĉi tiuj demandoj:

Ĉu vi lernis Esperanton sufiĉe por konversacii kun alilandano?

Ĉu vi bone scias ĝiajn regulojn?

Ĉu vi serioze studis la historion de Esperanto?

Sufiĉas por hodiaŭ Tamen mi estas tre scivola pri tio: Ĉu vi deziras perfektigi ĝis la venonta Jarkunveno?

Se jes, skribu al mi, kion vi deziras trovi en ĉi tiu rubriko.

Ju pli da deziresprimoj alvenos, des pli facile mi trovos la plej oportunan manieron por efektiviĝi mian taskon: helpi vin.

Madeleine HAUDEBINE

Cseh-Instruistino

Fasanvej 14

Aalborg, Danlando

ESPERANTISTA KRONIKO.

Boriša kaj Momirka MILIČEVIĆ geedziĝis la 13-an de novembro 1955-a.

Ilia konstanta adreso: RAČA apud Kuršmulija, Serbio. Jugoslavio.

Koran gratulon!

Veraj amulet-rememorigaĵoj de Afriko. Nun estas haveblaj en malgranda kvanto amuletoj, kiuj vere protektas vin kaj donas al vi bon-sorton, se vi kredas je tio. Unu vera specimeno kaj la sendado rekte al vi kostas entute nur 2.50 fl. aŭ egalvaloron.

L. Heilberg, Poste Restante, KITWE, Northern Rhodesia.

Ĉu landa, aŭ ĉiulanda kutimo?

La esperantistoj kunvenas ĉiujare en diversaj landoj. Dum kelke da tempo ili ĝuas la kongreson, la belan naturon, la pejzaĝon. Poste ili disiras kontente. Ĉu vere kontente? Ĉu scias ili iom pri la kutimoj kaj moroj de la forlasita lando? Kiaj tradicioj estas? Kiel vivas la homoj?

Por helpi ekkoni la popolajn kuti-

mojn en diversaj landoj, ni komencas serion de artikoloj. Bonvolu skribi al ni, ĉu la samaj kutimoj (aŭ similaj) ekzistas ankaŭ en viaj respektivaj landoj. Vi mem lernu kaj al ni instruu.

Ne lasu la artikolon sen respondo. Ni ĉiuj havas intereson pri la kutimoj de via lando.

La krespoj de la kandelfesto.

Ĉu vi scias, kio estas krespo? Krespo estas bona kukaĵo, kion oni preparas per tritika faruno, ovoj kaj lakto - kaj en Francujo per iom da „maljuna” konjako, por pli delikata gusto. Oni fritas ĝin en pato, se eble, super bela ligna fajro en kameno.

Oni precipe fritas krespojn okaze de la „grasa mardo” dum la karnavalo. Estas ankaŭ alia kutimo, laŭ kiu oni devas friti krespojn je Kandel-festo, t.e. la 2an de februaro.

Sed la krespojn oni ne preparu kiel ajn! Tute ne! Ĉiu familiano fritu sian propran krespon, tenante en la maldekstra mano arĝentan moneron. Li turnu sian fritantan krespon per lerta

movo de la pato, kiun li tenas per la dekstra mano. Tiel, oni-dire, li certe ne malhavos monon dum la venonta jaro.

En nia sudokcidenta regiono de Francujo antaŭ unu jarcento - eĉ malpli - precipe en la kamparaj domoj la kutimo estis eĉ pli kurioza: ĉiu familiano devis ne nur turnigi la krespojn, sed per la movo de la pato suprenĵeti ilin sur la supraĵon de la alta telermblo kie ili restis kaj sekigis kun tiuj de la antaŭaj jaroj, sub la polvo kaj araneaĵoj, dum multaj jaroj se la musoj ne manĝis ilin

Ĉu landa aŭ ĉiulanda kutimo?

Esploremulo.

Bruderhofa Komunumo.

La Bruderhofa komunumo en Anglujo nun uzas Esperanton. Nun fonditaj en Paragvajo, Urugvajo, Usono kaj Anglujo, la Bruderhofoj jam allogis pli ol mil homojn el dekok landoj tute sin doni al vivo de frateco kaj komuna divideco. La unua komunumo fondiĝis en Germanujo en la jaro 1920-a. Nun la angla kaj germana lingvoj estas ĉefe uzataj, sed pasintjare angla Esperantista familio aniĝis kaj tuj faris kontakton kun interesataj gesamideanoj en pli ol dekkvin lan-

doj. Sekve, la gefrataro decidis sendi du „fratojn” al Bolonjo kaj aliaj centroj en la espero ke Esperantistoj estos inter la multaj gastoj kiuj konstante vizitas la Bruderhofojn por partopreni en la laboro kaj sperti la gefratan vivon. Legantoj kiuj volas scii pli multe pri la Bruderhofa vivmaniero skribu al The Society of Brothers, Wheathill Bruderhof, Bromdon, Bridgnorth, Shropshire, Anglujo.

Derrick P. Faux.



KORESPOND- ADRESOJ

Ĉiu abonanto, aŭ grupo foje po jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

Franco: La Verda Stelo, Esperanto Grupo de CHATELLERAULT dez. kor. kun gejunuloj el ĉiuj landoj. Skribu al F-ino J. Labreuille, rue P. Curie, CHATELLERAULT Vienne).


Verrier Michel, 22 j. studento pri farmacio, 24 rue Bon-Houdart, DRANCY (Seine) dez. kor.

Germanujo: Sro Hans Best, Untere Mühlaustr. 218, MANNHEIM, gvidanto de Koresponda Servo petas

ĉiujn junajn esp. tutmondajn korespondi kun germanaj geamikoj. Sendu vian leterojn kun detalaj informoj al li.

Heinz Fray kaj Dieter Meissner, BOCHUM (21b), Kellermannsweg 64, 17 j. junuloj dez. kor. kun junaj fraŭlinoj, pref. el Nederlando.

Nederlando: 2 lernantoj, 11 jaraj, dez. kor. kun Surinamo kaj nekonataj landoj. Skribu al Sro W. Koopmans, Vosmaerlaan 3, Hilversum.



Rigardu ĉi bildojn kaj sendu al ni antaŭ la la de majo vian verkaĵeton.